

lingve kaj strukture estas klasika. En ĝi nevelkeble (tiel!) restis vivanta la juna freŝeco de la aŭtoro (li estis apenaŭ 18- aŭ 19-jara, kiam li verkis la dramon kaj nia lingvo kaj ĝia evoluo havis nur 25-26 jarojn!) kaj ĉarmo elburĝoniĝanta de nia originala literaturo. Estas neeble sen emocio relegi tiun ĉi beletran perlon, kiu konservis sian sorĉopovon dum paso de sinsekvaj jardekoj."

La verkon finas listo de originalaj verkoj de P r i v a t.

Bedaŭrinde preseraroj estas iom abundaj en ĉi tiu volumeto (pp. 11, 33, 36, 42, 46, 47, 53(3 ×), 55 (venos), 57 (ĉion, *kiu*), 58 (2 ×), 60, 87, 111).

Estas instrue konstati ke iuj lingvaj pekoj konstatataj ĉe modernaj aŭtoroj, ankaŭ troviĝas ĉe P r i v a t antaŭ duona jarcento: trouzo de *ig* [9: neŝanceligebla (ĉe B a g h y); 45: teruriga; 59: terurigitaj; 75, 106, 126: naŭziga]; forlaso de *iĝ* [45: banas; 50: rulas]; trouzo de *pli* en „*pli poste*” (113). Strange impresas *it* en: „Edzino mortis amate, neanstataŭite” (46) kaj „Minacitaj kapitaloj riskas elmigri” (52), en kiu lasta frazo la vorto *riskas* verŝajne devas esti *minacas*, aŭ la subjekto de *riskas* ne estu „*kapitaloj*”. Por paroli kun d e H o o g, ankaŭ la *kia*-malsano tiam jam ekzistis: „tiajn poemojn, *kia* ekzemple: *Mia penso*” (23), kaj la *kiom*-malsano: „*tiom* alte” (45). Ankaŭ la formon „*alies*” ni jam renkontas (51), kaj la misuzon de „*korespondas*” (22) anstataŭ *respondas*. Strange impresas la adverbo en „li ricevis internacilingve *leterojn*” (24). Pri uzo, resp. neuzo de akuzativo mi notu: „Kun la unua stelo en ĉielon ekfajras timo en la koron.” (45); „Jam la patro kuras, flugas, saltas trans ŝtonoj kaj *arbetoj*”, (45); „Patrino levis la fileton sur siajn brakojn ...” (49); „*spite sufero*” (77). Kritikindaj esprimoj ŝajnas cetere „la ŝtono *hejtiĝadis* sub hela suno” (41); „plumetoj pli *dolĉaj* ol neĝeroj ... tremetis *al* ĉiu bloveto” (41); „*glasereto*” (vitreteto) (26); „du fratinoj plenaj je apetito kaj pudro sur vangoj” (52); „li tiom amis ilin, ke li *nepre vizitis* ilin” (57); „Li nun *respondas ĵus vokante* vin” (111); „*Lia Eminenteco* la Kardinalo Arkepiskopo” (48). „*Vervenoj*” (79) estas arkaismo por „*verbenoj*”. Koncerne la tipografion mi rimarkigu ke la kritikitaj „ornamitaj” literkombinaĵoj *st* kaj *ch* troviĝas ankoraŭ en n-ro 3 de la serio (*Nur tri kolorojn*), sed jam ne en n-roj 4 kaj 5.

Ne estas eble sufiĉe laŭdi nian J. R é g u l o pro lia ekzempla eldona aktiveco! Subtenu lin per aĉetado! — W. P. R.

408.92(075.4) = 20

E 822

W. A. G e t h i n g : **Essential Esperanto**, Eldonaĵo de W. F o u l s h a m & Co., Ltd., Londono. Formato 12,3 × 18,3 cm²; 128 p., tola bindaĵo kun ora preso; prezo £ -/8/6.

Essential Esperanto estas taŭga kaj interesa lernolibro por anglalingvaj komencantoj, tute alispeca ol *Teach Yourself Esperanto*, kiun ni recenzis en Sc. R.

La aŭtoro utiligas la fakton, ke multaj Esperantaj vortoj estas tuj kompreneblaj por anglalingvuloj. Ĉefe tiajn vortojn li uzas por instrui la lingvon, la gramatikon, la sintakson, komencante per unuvortaj frazoj (imperativoj), tra du-, trivortaj frazoj, por jam baldaŭ atingi iom malsimplajn frazojn. Ĉi tiu metodo ŝajnas al mi interesa kaj intelekta ludo por la lernanto.

Ne estas multo kritikinda en ĉi tiu bonega libreto. Kiel en preskaŭ ĉiuj lernolibroj, ankaŭ en ĉi tiu la indikoj pri prononco estas nepre ne sufiĉaj kaj eĉ ne tute ĝustaj (pri *a, e, o, u*, kaj *r*). Oni devus multe pli atenti ĉi tiun punkton, ĉar fuŝita prononco estas malfacile korektebla. Iom grava kritiko estas ke la libro nenion instruas pri tio, ke ĉiu radiko laŭ sia signifo jam apartenas al iu vortokategorio, kaj ke tio ludas rolon ĉe la vortfarado. Sur pp. 22 kaj 23 inter la substantivoj troviĝas 8 kaj inter la adjektivoj 3 verbradikaj (el kiu unu - *amuzi* - ankaŭ troviĝas ĉe la verboj). Sur p. 33 ni legas ke el substantivoj ni povas derivi verbojn; el la 8 donitaj ekzemploj 7 estas ĝuste tiaj kun verbaj radikoj. Ankaŭ en la vortolisto sur pp. 105-113 troviĝas pli ol dek simplaj vortoj kun nepleonasma finaĵo.

La aŭtoro ja atentigas, ke kelkaj verbradikoj en Esperanto estas transitivaj, kaj aliaj estas netransitivaj (dum la respondaj anglaj verboj estas ambaŭ); inter la transitivaj mankis i.a. *rompi*.

Kritikinda estas ankaŭ „en kiun direkton” (pp. 95, 97, 100), se temas pri „en kiu direkto” aŭ „laŭ kiu direkto” (komp. p. 99). Nur se temas pri direkto-ŝanĝo, oni korekte diras ekz. „*mi turniĝis el la direkto al A en la direkton al B*”.

Kvankam ofte *da* estas tro uzata, mi opinias ke en la frazo (p. 63/5): „ĝi estis funto *de* butero, ne margarino”, *de* devus esti *da*, kaj ke tion *ne* ŝanĝas la fakto ke en ĉi tiu frazo oni emfazas *butero*. Cetere oni bezonus pri la uzo de *de* kaj *da* tutan serion da ekzemploj kaj pli da klarigo.

En la *ita-ata*-disputo la aŭtoro evidente apartenas - kiel la recenzanto - al la „herezuloj”. Iom tro rigora ŝajnas la aserto, ke participaj substantivoj ĉiam nur signifas personon, neniam aĵojn konkretajn aŭ abstraktajn (p. 72). Sur la sama paĝo - lastaj linioj - la aŭtoro diras ke en multaj dependaj propozicioj la tempo aŭ modo de la verbo ne dependas de tiu de la verbo en la ĉefa propozicio. Ĉu ne ĉiam estas tiel? Nur oni povus pli precizigi, dirante ke aparte ĉe objektaj kaj subjektaj propozicioj tial tre ofte tempo aŭ modo devias de tio kio estas kutima en la angla, kontraste kun la rilataj subpropozicioj. Restas kelkaj malgravaĵoj: *en* signifas nur *in*, ne *into* (p. 23). Mi ĝis nun nenie renkontis „*Helo!*” kiel Esperantan interjekcion aŭ saluton, kaj mi dirus ke bildopendas *sur*, ne *de* la muro. Ne ĝusta estas la aserto sur p. 69, meze, ke la angla lingvo uzas du helpverbojn por formi malsimplajn tempojn kaj modojn: *to have* kaj *to be*; forgesitaj estas ĉi tie *shall* kaj *will*.

Preseraroj estas malmultaj.

Konklude: rekomendinda libreto.

— W. P. R.